# ĈINA FERVOJISTO

# 中国铁路职工世界语者

## 2013.2



火车奔驰在中华大地，世界语联系世界人民

***La trajno galopas sur la ĉina lando,***

***Esperanto ligas la popolojn.***

# ENHAVO

★ LA 7-A ESPERANTO-KONGRESO DE NORDORIENTO KAJ INTERNA MONGOLIO DE ĈINIO ------------------------------------------ 1

★ FREŜA NOVAĴO: LA 10-A ĈINA KONGRESO DE ESPERANTO OKAZOS EN ZAOZHUANG --------------------------------------------------- 2

★ EKKONSTRUO DE LA KUNMING SUDA FERVOJSTACIO --------- 3

★ MIA VOJAĜO EN EŬROPO PER ESPERANTO (III) ------------------- 4

★ EL FERVOJA MONDO 5/2013 ----------------------------------------------- 8

★ ALIĜILO,ĈAMBRO MENDILO KAJ ĜENERALAJ INSTRUKCI-OJ POR LA 66-A KONGRESO DE IFEF ----------------------------------- 11

★ SCIIGO --------------------------------------------------------------------------14

**Frontpaĝe:**

**ANTAŬ LA ESPERANTO-DOMO DE LA KULTURA CENTRO ESPERANTISTA EN LA URBO CHAUX-DE-FONDS, SVISLANDO**

# LA 7-A ESPERANTO-KONGRESO DE NORDORIENTO KAJ INTERNA MONGOLIO DE ĈINIO

En la 16-18 de aŭgusto okazis la 7-a Esperanto-kongreso de tri nordorientaj provincoj kaj Aŭtonoma regiono de Interna Mongolio en Changchun, la ĉefurbo de Jilin-provinco, Ĉinio kun la kongrestemo "***Penege plibonigu la Esperantan kapablon***". Pli ol cent esperantistoj el Kunming de Yunnan-provinco, Shenyang de Liaoning-provinco, Jilin de Jilin-provinco, Harbin de Heilongjiang-provinco, Huhehaote kaj Baotou de Interna Mongolio, Beijing, Tianjin, Shanghai kaj aliaj urboj ĉeestis la kongreson, inkluzive de la estroj de Ĉina Esperanto-Ligo kaj Ĉina Fervojista Esperanto-Asocio. Inter la kongresanoj estis gesinjoroj Bak Gi Wan, kiuj laboras kaj loĝas en la urbo Yanji, la ĉefurbo de Yanbian-a Korea-nacieca Aŭtonoma regiono. La ĉiu programo de la kongreso konsistanta el vesperoj, prelegoj kaj kunsidoj iris en Esperanto.Ĉiuj kongresanoj ĝuis la etoson de Esperantujo. Dum la kongreso s-ro Han Zuwu, prezidanto de Ĉina Fervojista Esperanto-Asocio prezentis al ĉiuj ĉeestantoj pri la IFEF, ĝiaj kongresoj kaj siaj travivaĵoj en diversaj landoj. Sekve li respondis al la interesintoj pri la rilataj informoj de la IFEF-kongresoj kaj procedoj por partopreni en la kongresoj.




*Kunfoto de la kongresanoj*

En la 17-a de aŭgusto la pli ol dek fervojistoj renkontiĝis kaj kunsidis pri la preparado por la IFEF-kongreso okazonta en Ĉinio en 2015. S-rino Chen Shi, vicprezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo diris, ke refoja okazigo de IFEF-kongreso en Ĉinio estas grava evento en la Esperanto-movado en Ĉinio, ni devas subteni la aferon tutforte. S-ro Duan Yongxing, direktoro de Kunming-a Arta Instituto ĝoje esprimis, ke lokaj esperantistoj havas grandan feliĉon gastigi la IFEF-kongreson en Kunming, kies belaj turismaj vidindaĵoj, gastemaj nacimalpli-multoj aligas diverslandanojn kaj aktivajn esperantistojn.










Ni aktive preparos por la 67-a IFEF-kongreso en la bela ĉefurbo de Yunnan-a provinco, sudokcidenta parto de Ĉinio. La granda sukceso de la 45-a Konferenco de ILEI en Kunming en 2012 riĉigis iliajn spertojn en la organizado de la internaciaj kunvenoj kaj forte stimulas ilin bone plenumi la honoran taskon por la IFEF-kongreso. ■ **La red.**



# FREŜA NOVAĴO: LA 10-A ĈINA KONGRESO DE ESPERANTO OKAZOS EN ZAOZHUANG

*Estas decidite, ke la 10-a Ĉina kongreso de Esperanto okazos de la 15-a ĝis la 17-a de novembro ĉijare en la urbo Zaozhuang, Shandong-provinco. Tio estas ĝojinda kaj gratulinda granda evento en la Esperanto-movado en Ĉinio. Dum la kongreso inaŭguriĝos la Ĉina Esperanto-Muzeo en Zaozhuang-a instituto, kiu unuafoje bonvenigos la unuajn vizitantojn venontajn de diverslokaj esperantistoj de Ĉinio en la bela ora aŭtuno. En la programo de la kongreso estos la niveloj B1,B2 kaj C1 de la UEA-KER ekzamenoj, kunsidoj de Ĉina Fervojista Esperanto-Asocio, ĉina sekcio de ILEI, Ĉina Junulara Asocio kaj estroj de diverlokaj Esperanto-organizoj, krome okazos vesperoj kaj ekskursoj dum kaj post la kongreso. ĈFEA konigos al la kongresanoj pri la 67-a Esperanto-kongreso de IFEF okazonta en Kunming en 2015 en Ĉinio. En la kongreso estos elektitaj novaj estraro kaj konsilantoj de ĈEL, estos premiitaj avangardaj lokaj Esperanto-organizaĵoj kaj modelaj individuaj esperantistoj.*




*Kompreneble ĉinaj fervojistoj renkontiĝos kaj kunsidos en Zaozhuang por diskuti pri la asocia afero de ĈFEA kaj preparado por la IFEF-kongreso ktp. Ili klopodos plene por sukcesigi la kongreson. Ĉinaj fervojistoj kaj ĉinaj esperantistoj bonvenigas diverslandajn fervojistojn kaj amikojn en la mondo al Ĉinio.*

*Jen estas la skemo pri la situo de la urbo Kunming kaj Yunnan-provinco de Ĉinio.* ■

*- La red.*

# EKKONSTRUO DE LA KUNMING SUDA FERVOJSTACIO


La Kunming suda fervojstacio, kunliganta grandrapidajn fervojliniojn Yungui, Hukun, Kunyu kaj aliajn novkontruitajn liniojn, ekkonstruiĝos en novembro 2013. Kiam la nova Kunming suda stacio estos finkonstruita, ĝi kunfunkcios kun la nuna fervojstacio Kunming samtempe. La nova Kunming suda stacio estos finkonstruita kaj funkciiĝos en 2016.

La nova Kunming suda fervojstacio situas en la Nova Chenggong distrikto ĉe Longtan-monto de la urbo Kunming. La nova stacio proksimiĝas al la novkonstruita urba administra centro je 3 kilometroj kaj distancas al Kunming fervojstacio 28 km. La tuta konstrua areo estas 334 700 kvadratajn metrojn. La totala investo estas 3 miliardoj 280 milionoj da RMB yuanoj. Laŭ la projekto la stacidomo inkluzivas 16 peronojn kaj 30 relojn. La jara ekspeda plano de la stacio estas: freŝdataj priservitaj pasaĝeroj estos 31 200 000, foraj estos 46 930 000, tagmeznombraj -- 128 000, la pintotrafikhoraj -- 12 000, la plej alta kolektnombro de pasaĝeroj -- 12 000.

La nova Kunming suda stacio determinos la funkcion de grandrapidaj pasaĝer-trajnoj de la linioj Hukun, Yungui kaj aliaj, sed la nuna Kunming stacio- mezrapidaj trajnoj.


La nova stacio de la urbo “brila perlo en altebenaĵo” karakteriziĝas kun la temo “dancantaj paseroj en la bele floranta printempa urbo ” per la konstrua lingvo “nacia harmonio kaj internacia interfluo” “sudokcidenta nodo kaj sudazia pordo”.

La nova stacidomo havas kvar etaĝojn:tri surteraj etaĝoj kaj unu subteraj etaĝoj. La teraj tri etaĝoj estas atendejoj, la dua etaĝo estas peronoj, la unua etaĝo estas transŝanĝa halo,elirejoj, taksia akceptejo kaj ekipaĵoj, la subtera etaĝo estas la peronoj de metrooj N-ro 1 kaj N-ro 4. La nova Kunming suda stacio formos la grandegan multforman artikon de fervojo, metroo, aŭtobuso, taksio kaj aliaj trafikiloj. ■ -- ***de Han Zuwu***









# MIA VOJAĜO EN EŬROPO PER ESPERANTO（III）

**HAN ZUWU**

### La Interkultura Centro Herzberg



*La domo de la Interkultura Centro Herzberg*

Antaŭ malgranda duetaĝa domo sidanta en la urbocentro de Herzberg am Harz staras du flagostangoj ambaŭflanke de la pordo de la domo. Sur unu el ili flirtas la verdstela flago kaj sur la alia -- la flago de la Eŭropa Unio. De sur la muro ĉe la pordo pendas kupra tabulo sur kiu legiĝas verdaj vortoj: Inter- kultura Centro Herz- berg kaj Germana Esperanto-Centro.En la unua etaĝo estas kuirejo, tualetejo, konservejo kaj dormoĉambroj, sur la dua -- kunvenejo, klasĉambro, biblioteko, arkivo, kabineto, pres- kaj kopi-ĉambro. La centro konsistas el tri organizoj: la Germana Esperanto-Centro, inkl. de la eduka kaj kultura filio de la Germana Esperanto-Asocio, la Germana ILEI-sekcio kaj la regiona klubo Esperanto-Societo Sud-harco (Südharz).




*La kupra ŝildo de la Interkultura Centro Herzberg kaj la Germana Esperanto-Centro*

Dank' al klopodado de loka esperantisto s-ro Joachim Giessner dum dekoj da jaroj, la centro estis fondita en la 20-a de novembro 2004. Kaj ankaŭ dank' al plurflanka klopodado de s-ro Peter Zilvar kaj s-ino Zsofia Korody, la urba parlamento unuanime konsentis kaj decidis nomi la urbon Herzberg am Harz per la Esperanto-urbo.




*Kunfotado antaŭ la pordo de la Interkultura Centro Herzberg*

Kiel kunlaboranto de la urba registaro Herzberg am Harz, la Interkultura Centro Herzberg kune kun la urba registaro konstruis bazan E-organizon en la urbo por servi al Esperanto. Aperis en la urbo unue la Interkultura Centro Herzberg, bonvenigŝildoj kaj vojmontriloj en la lingvoj germana kaj Esperanta, poste Esperantaj memoraĵoj kaj slogano-tabulo, propagandaj folioj faldeblaj, poŝtkartoj, statuo de L. L. Zamenhof, Esperanto-Muzeo, Esperanta Ekspozicio, Esperantaj retpaĝoj, informiloj kaj turismaj gvidlibroj en pluraj lingvoj kaj tiel plu. La Interkultura Centro Herzberg liveras servojn por Esperantaj projektado, tradukado, desegnado kaj farado. La laborantoj de la Interkultura Centro Herzberg estis ĉefaj organizantoj de la ĉi-foja Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso, kaj en ordinaraj tagoj ili ofte faras interŝanĝojn kun Esperantaj organizoj kaj individuoj el diversaj landoj de la mondo.




**Esperanto-trinkejo en Munĥeno**

Munĥeno, la tria granda urbo de Germanio post Berlino kaj Hamburgo, estas la ĉefurbo de Bavario. Ĝi funkcias kiel la plej granda centro ekonomia, trafika kaj kultura. En la fervoja stacidomo ni renkontiĝis kun samideanoj Fritz Hilpert kaj Georg Kriegmair, kiuj

nin atendas tie. Ili nin akompanis viziti la urbon kaj vespere s-ro Fritz Hilpert kondukis nin al Esperanto-trinkejo por trinki bieron.

La trinkejo "Esperanto" lasis al ni profundan impreson. Kiam ni eniris en ĝin, la mastrino nin salutis unue. Je tio mi komprenis, ke s-ro Fritz Hilpert estas ofta kliento de la trinkejo. La tieaj klientoj plejparte estas afrikaj amikoj. La mastrino estas nigra virino en la aĝo de pli ol 30 jaroj kaj tre flue parolas germane. Al ŝi nin prezentis s-ro Fritz Hilpert, kaj ŝi montris al ni, du ĉinoj, sian plej grandan gastamon kaj afablecon. Mi kaj ŝi interparolis trinkante bieron. Mi demandis al ŝi : "Kial via trinkejo portas la nomon Esperanto?" Ŝi respondis, ke ĉar Esperanto estas la komuna lingvo de la tuta mondo kaj helpas allogi klientojn. Mi demandis ankaŭ: "Ĉu vi kaj viaj servistoj scipovas paroli en Esperanto? " Ŝi neis. Je tio, mi faris al ŝi kurson pri Esperanto kaj proponis al ŝi lerni la lingvon, ĉar "en la urbo Munĥeno viglas Esperanto-movado kaj multas esperantistoj. De ili vi povos lerni Esperanton, kaj pro tio, ke vi parolas Esperanton, pli da esperantistoj el diversaj lokoj de la mondo venos al vi por ĝui bieron." Ŝi jesis kun rideto. Kiam ni volis forlasi la trinkejon, la mastrino kunfotiĝis kun ni.


Kun la mastrino de la trinkejo "Esperanto" en Munĥeno

Sur la vojo al nia hotelo s-ro Fritz Hilpert diris al mi : "Mi dankas vin pro tio, ke vi diskonigis al ili Esperanton. Venonte, ni kunlaboros kun ili kaj faros la trinkejon unu el la aktivejoj de Esperanta klubo en la urbo Munĥeno. "

**Vizito al la Kultura Centro Esperantista de Svislando**

La Kultura Centro Esperantista (KCE) de Svislando portas ankaŭ la nomon "Esperanto-Domo de KCE". Ĝi sidas en la malgranda urbo en nordokcidenta Svislando kun pitoreskaj pejzaĝoj. Nin tiklis la tieaj naturaj pejzaĝoj, vigla Esperanto-movado kaj ankaŭ s-ino Liu Jun, vicĝenerala sekretario de la Tianjin-a Esperanto-Asocio. Post sia edziniĝo al s-ro Dieter Rooke en la pasitna jaro ŝi vivas kaj laboras en tiu ĉi urbo malgranda kaj ĉarma. Ni, veninte el ŝia hejmloko, alportis al ŝi informojn pri


Kun Giorgio Silfer (centre),prezidanto de la Kultura Centro Esperantista (KCE) kaj ĝia vicprezidanto Dieter Rooke

Esperanto-movado de la hejmlando, salutojn de samideanoj el Tianjin, kondimentojn por ĉinaj pladoj kaj tiel plu.

S-ino Liu Jun kaj ŝia edzo s-ro Dieter Rooke nin bonvenigis en la fervoja stacidomo de la urbo. S-ro Giorgio Silfer, prezidanto de la centro, nin akceptis en la centro kaj prezentis al ni ĝian vicprezidanton s-ro Dieter Rooke, s-inon Anna Bartek, s-inon Marcanti kaj aliajn membrojn de la centro. Post tio li gvidis nin viziti la centron kaj samtempe konigis al ni ĝiajn strukturon kaj ĝeneralan situacion.

Tiu ĉi Kultura Centro Esperantista estas la plej granda inter tiuj kiujn ni vizitis. La sidejo de la centro konsistanta el kvar etaĝoj areas 17 mil kvadratajn metrojn. En la unua etaĝo estas kunvenejo, klasĉambro, manĝejo kaj kuirejo, en la dua -- klasĉambro, kunvenejo, kabineto, biblioteko, ĉambro por dosieroj kaj referencoj, la tria kaj la kvara -- gastoĉambroj, stokejo kaj tiel plu. En la centro ofte okazas trejnaj kursoj, renkontiĝoj, prelegoj, vizito de esperantistoj el diversaj landoj por seminarioj kaj aliaj agadoj.



Skemo de KCE

Ankaŭ la redakcio de "Heroldo" sidas ĉi tie. S-ino Anna Bartek estas ne nur veterana redaktoro, sed ankaŭ fama kantisto. Ek de la jaro 1984 ŝi komencis kanti Esperantajn kantojn kaj faris prezentadon en diversaj Esperanto-kunvenoj kaj aktivadoj en diversaj partoj de la mondo. S-ino Liu Jun servas kiel sekretario de la centro kaj funkcias kiel ligilo inter esperantistoj de Ĉinio kaj Svislando. En la vespera manĝo la gastigantoj kaj la gastoj interparolis pri diversaj aferoj, ekz., pri la 64-a Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso ĵus fermita en la urbo Herzberg am Harz, pri la de Ĉinio gastigonta 67-a Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso en la jaro 2015, pri plurfoja vizito de s-ro Dieter Rooke al Ĉinio, pri la 45-a Konferenco de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj okazonta en Kunming de Ĉinio julie de la kuranta jaro, pri la malgranda urbo La Chaux-de-Fonds de Svislando, pri la urbo Tianjin de Ĉinio, pri Ĉinio, pri Svislando kaj tiel plu... La de mi alportita vino de Ĉinio estis ege aplaŭdita de la ĉeestantoj. Intertempe, s-ino Anna Bartek certe prezentis Esperantajn kantojn. Estis pli interesa, ke la ĉeestantoj sate ĝuis la fragmentojn de pekina opero kantitajn de respondeculo el la Tianjin-a Federacio de Sociaj Sciencoj. Esperantistoj ĉinaj kaj alilandaj estis dronitaj en gaja etoso kun densa koloro de Esperantujo. ■ ***-daŭrigota***

# El fervoja mondo 5/2013


**Aŭstrio**: ***ÖBB* aĉetos novajn veturilojn**

Kontrola aŭtoritato de Aŭstraj Federaciaj Fervojoj *ÖBB* aprobis firmaan mendon por aĉeti 100 elektrajn kelkvagonajn veturilkombinaĵojn *Siemens Desiro ML*. Kontrakto havas valoron 550 milionojn da eŭroj. Trivagonaj veturilkombinaĵoj por rapido 160 km/h estos liverataj ĝis fino de 2015. La mendilo inkluzivas 30 kombinaĵojn por denseca amastransporto sur reto *S-Bahn* en Vieno. La veturilkombinaĵoj havos po 244 sidlokoj, kaj por rapida eltrajniĝo estos provizitaj po ses pordoj en ambaŭ flankoj. Pliaj 70 veturilkombinaĵoj prezentos regionan modifon kun po 259 sidlokoj kaj po kvar pordoj en ĉiu flanko, 35 estos ekspluatataj en Malsupra Aŭstrio, 18 en Stirio kaj 17 en Supra Aŭstrio.

**Britio:** **Elektrizado de fervojlinioj en Britio**

En Britio estas elektrizitaj malpli ol 40 procentoj de fervojaj linioj. Preskaŭ du trionoj de elektrizitaj linioj estas kurentoprovizataj de elektrotensio 660 aŭ 750 V, kaj energio estas distribuata helpe de flanka relo. Tiu ĉi sistemo estas konvena prefere por malpezaj pasaĝertrajnoj kaj limigita por rapidoj ĉirkaŭ 100 mejlojn en horo. Pli konvena alternkurenta sistemo 25 kV/50 Hz pro tio estas instalata sur pli gravaj linioj, kiuj estas elektrizitaj proporcie malmultaj. Ekde jaro 2016 estos elektrizita linio *Great Western Mail Line* el Londono al *Bristol*, kaj en 2017 ĝia daŭrigo al *Cardiff* kaj *Swansea*. Sur la linio trafikas elektraj trajnoj jam ekde la jaro 1994, tamen nur sur 19 kilometroj el londona stacio *Paddington* al flughaveno *Heathrow*, kie estas ekspluatataj flughavenaj eksprestrajnoj.

Unuafoje en Valeso




Fervoja linio *Paddington – Bristol Temple Meads* tra stacioj *Didcot Parkway, Swindon* kaj *Bath* longas 190 km. En *Bristol*, kie plej eluzata estas trapasebla stacio *Temple Meads*, estas preparata situacio, ke trajnoj el Londono post elektrizado finos en malnova kapstacio, en memorprotektata historia stacidomo el jaro 1840, konstruita de la konstruisto *Brunel*. Temas pri la plej malnova kapstacio en la mondo, kiu depost la jaro 1965 ne estas trafikuzata, trakaro estas malmuntita, kaj relvoja tereno servas kiel parkejo.

Elektra trafiko aperos ne nur sur *Great Western Mail Line*, sed ankaŭ sur de ĝi deturnaj branĉvojoj. Temas ekzemple pri 27 km longa linio *Reading – Newbury* aŭ *Cherwell Valley Line* en linioparto *Didcot Parkway – Oxford*. Elektraj trajnoj aperos ankaŭ sur *South Wales Main Line*,

konkrete sur linio el *Wootton Bassett* al *Swansea*. Por elektrizado estas planataj ankaŭ linioj en ĉirkaŭaĵo de *Cardiff*, kiuj alligiĝas al linioj *South Wales Main Line*. Por Valeso, kiu simile kiel Albanio aŭ Moldavio dume havas neniun elektrizitan fervojlinion, tio sendube fariĝos elstara okazaĵo.

Dum unu nokto kontaktlineo sur 1,6 km de linio

Kun elektrizo estas kunligita ankaŭ ekipaĵo de linioj pri nova sekurecaranĝaĵo, sed ankaŭ aĉeto de relveturiloj. Sur fervoja linio trafikos novaj trajnkompletoj kun nomindiko *Super Express* de la firmao *Hitachi*. Tiuj ĉi trajnoj, atingantaj maksimuman rapidon 225 km/h, estos ekipitaj de eŭropa sekursistemo *ETCS Level 2*. Por elektrizaj laboroj trafikisto de brita fervoja infrastrukturo, kompanio *Network Rail*, mendis de germana fabrikisto *Windhoff* specialan trajnon por konstrulaboroj kun 23 vagonoj, kies prezo estos 35 milionojn da sterlingaj funtoj. Oni atendas, ke skipoj da dungitoj de la speciala trajno povus en unu nokto komplete munti trolean kontaktlineon 1,6 km longan, kompreneble antaŭe konstrue preparitan. Konstrulaboroj sur *Great Western Mail Line* povus komenci jam en jaro 2013. Entutaj kostoj por modernigo, en kiu estas enkalkulita elektrizo, sekurecaranĝaĵo, sed ankaŭ relveturiloj, atingos ĉirkaŭ 5 miliardojn da sterlingaj funtoj.

En norda Anglio elektrizado pli rapidas




Brita registaro en somero 2012 aldone aprobis sumon 4,2 miliardojn da sterlingaj funtoj por plia modernigo de fervojaj linioj, kiu estas destinita por jaroj 2014 ĝis 2019. Nove estos elektrizitaj ekzemple linioj *Basong-stoke – Reading*, *Oxford – Leamington – Coventry* aŭ *Oxford – Bedford*, kaj aliaj. En norda parto de Anglio elektrizaj laboroj jam okazas, kaj en venontaj jaroj estos iom-post-iome finitaj. Temas pri linioj *Manchester – Newton-le-Willows* (fino estas planata en 2013), *Manchester – Liverpool* kaj *Huyton Wigan* (planata en 2014), kaj *Manchester – Preston – Blackpool* (planata en jaro 2016). Al tio apartenas novaj elektrizaj projektoj *Crossrail* kaj *Thameslink* en londona regiono por jaro 2018.

Ĉiuj nove elektrizataj linioj funkcios je alternkurento 25 kV/50 Hz. Fakuloj asertas, ke temas pri baza rekonstruo de fervoja infrastrukturo, kiu en lasta dekjaro en Britio ne havas analogion. Financado estas dividita tiel, ke parto de la mono por konstruado estos uzata el plialtigitaj veturkostoj (pasaĝeroj), pri kiu estis decidite jam en la jaro 2010, kaj plia parto de rimedoj venos el ŝparitaj transportkostoj sur elektrizitaj linioj, nun surveturigataj de termikmotora trakcio.



**Ĉeĥio: Senbariera veturilaro de Ĉeĥaj Fervojoj havas jam 537 veturilojn**

En jaro 2012 Ĉeĥaj Fervojoj plinombrigis sian veturilaron pri rekorda nombro de novaj senbarieraj trajnkompletoj kaj vagonoj. Nove aldoniĝis 83 kaj sume jam estas ekspluatataj 537 veturiloj. Modernaj senbarieraj pasaĝervagonoj aperas kiel per

rekonstruado de pli malnovaj, ĝis nun barieraj veturiloj, tiel per livero kaj entrafikigo de tute novaj pasaĝervagonoj. En horaro 2013 estis aldonitaj ekzemple du novaj rapidtrajnaj senbarieraj lineoj. La plej multajn senbarierajn veturilojn oni enkondukis en regiona trafiko.

**Egiptio:** **Metroo en Kairo ekspluatos sudkoreajn veturilojn**

Ŝtata oficejo por tuneloj subskribis en unua duono de januaro 2013 kontrakton en valoro 2,16 miliardojn da egiptaj pundoj kun firmao *Hyundai Rotem* por liveri 20 naŭvagonajn klimatizatajn trajnkompletojn por metrolinio en Kairo. La interkonsento determinas, ke loke produktataj komponentoj prezentos almenaŭ 22 procentojn da komerca valoro. La kompanio *Hyundai Rotem* prizorgos bontenadon kaj riparojn de la vagonoj dum ok jaroj post fino de dujara responsa limtempo.

**Francio:** **Batalo por krei holdingon de *SNCF* kaj *RFF***

Franca registaro anoncis planon por kunligo de kompanioj *SNCF* (trafikisto) kaj *RFF* (administranto de infrastrukturo) tiel, ke ili komune formu holdingon kaj samtempe plenumu leĝdonon de EU. Laŭ trafikministerio nuntempa infrastrukturo ne estas funkcia, kaj ŝuldoj de trafika kompanio kreskas. Laŭ ĝia klarigo administracio de infrastrukturo estu plifortigota pri sekcio bontenado de veturilaro. Samtempe estos enkondukataj klaraj reguloj, laŭ kiuj estos eble destini prioritatojn por unuopajn trafikistojn. La plano antaŭvidas krome fondi kontrolkomitaton, kiu solvos eventualajn konfliktojn.

**Hispanio**: **Unua grandrapida fervojlinio transiras landlimon**

Komence de januaro 2013 Hispaniuo ovaciis finkonstruon de unua grandrapida linio, kunliganta Pirenean Duoninsulon kun aliaj eŭropaj landoj. Projekto en valoro 3,7 miliardojn da eŭroj kovris krom alia konstruon de 30 tuneloj kaj ekipadon per sistemo *ERTMS*. Konstruado de fervoja linio Madrido – Barcelono – *Figueras* estis grandparte dotita el fondusoj de Eŭropa Unio, el kiuj venis 3,44 miliardoj da eŭroj.

**Italio:** **Financa subteno de EU por konstruo de tuneloj**

Eŭropa Unio donos financan subtenon 10 milionojn da eŭroj al du bazaj fervojaj infrastrukturaj projektoj en norda Italio. La projektoj helpos realigi survojigon el franca *Lyon* al ukraina lanlimo. Tiu unua ricevos monsubtenon 5 milionojn da eŭroj, la monsumo estas destinita precipe por teknika ekipaĵo de milana kontrola centro por linitraceo Torino – Milano – *Verona* – *Padova*. La dua itala projekto, kiu ricevos restantajn 5 milionojn da eŭroj, entenas konstruon de du tuneloj sur la menciita fervojlinio.

**Svedio:** **Debato pri verdaj vartrajnaj koridoroj**

En unua duono de januaro 2013 en *Göteborg* okazis fina laborkunsido por projekto *Supergreen* (Superverda). Celo de la projekto estas subteni evoluon de fervoja vartrafiko per vojo, kiu estas favora por vivmedio. Ĉe komenco de la pritraktata projekto estis aŭdeblaj antaŭtimaj voĉoj, ke kriterioj pri respekto al vivmedio superos ekonomiajn postulojn. Rezulto de fina studio elfluis en kompromison. Inter moderigaj konsiloj en fino de la studio estas precipe alvoko al Komisiono, ke ĝi daŭrigu pligrandigi konkurenckapablon de la fervojo kaj direktiĝi je multmodalaj koridoroj. ■

**Preparis *Jindřich Tomíšek***
**Reviziis *Heinz Hoffmann***




# ALIĜILO por la 66-a kongreso de IFEF

**17-a ĝis 24-a de majo 2014**

**LKK-adreso :** Vito TORNILLO via S. D'Acquisto, 9/5

IT-40050 Monte San Pietro –BO– Italio

Retadreso : **vitorni@virgilio.it**

**Banko-nomo : (**ankoraŭ ne aktiva, informoj sur IF aŭ ifef.net aŭ al supra retadreso)

**IBAN: IT Mi aligas al la 66-a IFEF-kongreso en urbo San Benedetto del Tronto - Italio**

IFEF-ano jes □ ne □ viro □ virino □

Familianomo : ..........................................................................................................................

Persona nomo : ....................................................... Naskigjaro : ………....................................

Adreso:strato ..........................................................................................................................

Postkodo: ……….......................... Urbo: ....................................................

Lando: ....................................... Telefono: ............................................................

Retadreso: ...........................................................................

| Kongreskotizo en eŭroj | Ĝis | Poste | Sumo |
|---|---|---|---|
| IFEF-membro | 60 | 80 | |
| Familiano kaj junul(in)o gis 30 jaraj kaj logantoj el B landoj lau | 30 | 50 | |
| Ne IFEF-membro | 75 | 95 | |
| Cambro-perado por aligilo | | 3 | |
| Tranoktado laŭ elekto ( minimume 1 nokto) | | | |
| Libervola donaco al la kongresa kaso | | | |
| **Proponataj ekskursoj en euroj** | | | |
| Dimanĉon | Urbovizitado | 5 | 5.00 |
| Lundon | Duontaga Ekskurso 1 | 15 | 15.00 |
| Merkredon | Tuttaga ekskurso | 50 | 50.00 |
| Vendredon | Duontaga Ekskurso 2 | 15 | 15.00 |
| Sabaton | Krom restado (ekskursoj) x tagoj | | |
| **Sume en eŭro** | | | |




Kongresnumero__________

# Ĉambro mendilo

## Por la 66a IFEF kongreso San Benedetto del Tronto - Italio

17a ĝis 24a de majo 2014

(Bonvolu plenigi la formularon majuskle) s-ro ☐ s-rino ☐

Familia nomo: ......................................................................

Persona nomo: ............................................. Naskiĝjaro:……….

Adreso: strato...............................................................

Poŝtkodo,……….. Urbo:.................................. Lando:...................

Mi mendas jenajn noktojn (Bonvolu kruci laŭ via deziro) :

| Noktoj | 15/16 | 16/17 | 17/18 | 18/19 | 19/20 | 20/21 | 21/22 | 22/23 | 23/24 | 24/.... |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| | | | | | | | | | | |

| **Ĉambroprezo** kun **plena pensiono** por unu persono kaj por unu nokto | 4-stela hotelo | 3-stela hotelo |
|---|---|---|
| Unulita ĉambro | 65,00 € | 55,00 € |
| Dulita ĉambro | 58,00 € | 50,00 € |

Mi elektas hotelon …………..stela ………..lita ĉambro

Mi pagas la kotizon de unu nokto je mia aliĝo, la reston mi pagos al la hotelo.

Mi deziras loĝi kun:.........................................................................................

Mi konfirmas, ke mi konsentas kun la Ĝeneralaj instrukcioj presitaj en ĉi tiu aliĝilo kaj aparte deklaras, ke mi havas san-kaj akcident- asekuron por mia restad-tempo en Italio dum la 66-a IFEF-Kongreso.

Mi konsentas ke mia nomo, lando, urbo aperu en kongreslibro ☐

Mi alvenos al San Benedetto del Tronto per ………....la........ .-an de majo je la….......-a horo.

Loko,………………..dato………….. …. Subskribo…………………………...

Notoj por via bezonoj:

# ĜENERALAJ INSTRUKCIOJ

1. Ĉiu partoprenanto bonvolu plenigi kaj sendi apartan aliĝilon por la kongreso al adreso de LKK.
2. Sendu la pagon, nur en eŭroj, al la indikita bankkonto de la LKK. Oni traktos la aliĝilon nur post alveno de la pago.
3. Se vi pagas por alia persono, kiu nepre devas sendi apartan aliĝilon, menciu precizajn informojn pri la koncerna persono (nomo, lando, adreso).
4. Kongreskotizo neniukaze estas repagebla. La pagoj por la ceteraj servoj estas repageblaj post la depreno de 10% por administrado, kondiĉe ke LKK ricevis la malmendon antaŭ la 31-a de marto 2014.
5. LKK konfirmos la akcepton de ĉiu aliĝilo post la ricevo de la koncerna pago kun indiko de via kongresa numero kaj de ĉiuj antaŭmenditaj kaj antaŭpagitaj servoj.
6. LKK havas la rajtojn ŝanĝi la prezojn, se inflacio aŭ aliaj ne antaŭvideblaj kondiĉoj postulus tion.






Kiel atingi San Benedetto:
Aviadile al flughavenoj de Ancona kaj Pescara; povus esti pli taŭga tiu de Bologna (pro la pligranda ebleco da flugoj) kaj poste trajne.
Trajne: de Bologna, ĉiuj IC al Bari haltas en SanBenedetto (3 Horoj); per rapidaj trajnoj (FB) kun ŝanĝo en Ancona.
Aŭtomobile: laŭ la adriatika aŭtoŝoseo.
La kongresejo situas tuj malantaŭ la stacidomon, piede 3 minutoj.

Freŝaj informoj en: www.ifef.net

**Ĉina Fervojista Esperanto-Asocio (ĈFEA)**

NO. 1 Gaolou, 36 Hao,

Tieluju Houyuan Sushe,

Huhehaote Neimenggu

010057 Ĉinio

Honora prezidanto **:Li Sen**

Tel:86-471-2244400

<gaols720@163.com>

Prezidanto: **HAN Zuwu**

Jin Wan Hua Yuan 28-4-201,

Cheng Lin Lu, Hedong Qu,

Tianjin 300161 Ĉinio

Tel./fakso: 86-22-84511237

<hanzuwu@hotmail.com>

Vicprezidanto **Xiao Ke**

Tel.13789511975

<xkstepo@126.com>

Vicprezidanto:**LIU Caisheng**

Baiwanzhuang 24, Fu Cheng

Men Wai Beijing 100037

Ĉinio

Ĝenerala sekretario:

**Chi Tienan**

Tel.86-471-6247994

<ferulo@163.com>

Vicĝenerala sekretario:**ZHANG Dali**

<fortego@sina.com>

Vicĝenerala sekretario/

Kasistino:

**ZHANG Jianjun**

Tel: 86-471-2242954

<jjz-sana@163.com>

# SCIIGO

*Karaj ĉinaj fervojistoj,*

*La 10-a ĉina kongreso de Esperanto okazos inter la 15-17 de novembro 2013 en Zaozhuang, provinco Shandong.*

*Dum la kongreso ĉinaj fervojistoj okazigos la fervojfakan kunsidon pri la faka afero, nia venontjara laboro, la preparado por la 67-a IFEF-kongreso en Kunming de Ĉinio en 2015 ktp.*

*Bonvolu sciigi niajn membrojn unu al la alia, ke la ĉefoj aŭ reprezentantoj de divers-fervojburoaj Esperanto-organizoj alvenu al la hotelo ZAO-ZHUANG de la kongresa urbo Zaozhuang.*

*Ĝis la baldaŭa renkontiĝo en Zaozhuang!*

*Ĉina Fervojista Esperanto-Asocio*